

2018-07-28 verkado 10 :00 en la flughaveno Madrid-Barajas; sendado 16:30 el UK en Lisbono
ILEI anoncas

En la aliĝolisto aperas tri personoj el Tunizio kaj du el Tanzanio. Ili ne aperis en Madrido, bedaŭrinde. Supozeble la akiro de vizo problemis.

La Ligo havas novan estraron. Ĝi kunvenis marde je la 16a horo kaj eklaboris en ĉeesto de kvin el siaj sep membroj.

Ĵaŭde kaj vendrede okazis SIMPOZIO kun prelego pri la universitato UNED fare de la estrino de la lingva centro de tiu stablo. Deko da prelegoj de elstaraj esperantistoj faris, ke tiu evento estis fervore partoprenita de la kongresanaro. Fine de la simpozio la publiko kaj la prelegintoj povis debati pri la organizaj aspektoj de tia evento kaj pri la enhavo kaj niveloj de la prelegoj. Aŭdiĝis utilaj informoj por la estonta laboro de la Ligo.

La internacia Vespero prezentita de Elena Nadikova ofertis sinsekvon de belaj dancoj kun koloraj kostumoj, diversajn rakontojn kaj ŝercojn, kantojn, dancojn, en gaja etoso. La kunlaboro kaj helpo de Kaito ĝojigis ĉiujn. La duopo Kaito eĉ ankoraŭ kantis en la manĝejo vendrede okaze de la lasta komuna manĝo.

En la konkluda kunsido ni povis malkovri la urbon Ĉaĉak en Serbio, kie okazos la 52-a ILEI-Kongreso en julio 2019 antaŭ UK en Lahti, Finnlando. Fotoj kaj informoj nutris la scivolemon de la kongresanoj.

Sekvis rapida trarigardo de la aktivecoj de ILEI, kiu sugestis al du membroj veni al la prezidanto kaj anonci kunlaboremon. Agrabla momento !

La prezidanto povis disdoni diplomon pri Honora Membreco al Duncan Charters, kiu plie portos al Usono la diplomon por Ronald Glossop.

Katalin Kovats kaj Mireille Grosjean disdonis unu atestilon al Elisabeth Le Dru, kiu sukcese finis la lertigadon EIT : Esperanto Instruista Trejnado. Plie Katalin Kovats, respondeculino pri la KER-ekzamenoj, povis disdoni amason da diplomoj al diversaj personoj el diversaj foraj landoj, kun peto, ke ili disdonu la diplomojn al siaj samlandanoj. La fama burunda esperantisto Jérémie Sabiyumva ricevis de Karine Arakeljan, prezidantino de IEK Internacia Ekzamena Komisiono, stokon de deko da diplomoj por la sukcesintoj de la sesio de ILEI/UEA ekzamenoj en Nyaza-Lac okaze de la Burunda Kongreso en aprilo 2018.

La universitato UNED, kiu laboras per malĉeesta instruado, lanĉas novan kurson pri Esperanto kunlabore kun la Hispana Esperanto Federacio (HEF). Kreiĝis laborgrupo okaze de vasta ideointerŝanĝo kun Profesoro Manuel Pancorbo, profesoro en la UNED, aliaj hispanaj kolegoj kaj du reprezentantoj de ILEI : Mirejo Grosjean kaj « Unika », nova estrarano. Plie Profesoro Duncan Charters kunlaboros. Ĉu tiu eventofara enkonduko ligiĝas al la okazigo de nia kongreso kaj okazis dum la preparlaboroj, mi ne povas firme aserti.

La LKK estis efika, afabla kaj kompetenta, ĝi faris bonegan laboron antaŭ kaj dum la Kongreso. Granda danko iru al ili.

Raportas Mireille Grosjean